Hermann Löns,

Akvomuelilo ĉe Monastero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Siringo kaj lilak' odore
En mia laŭb' ĉirkaŭas min,
Laburno-branĉoj pezaflore
Desupre pendoligas sin.

Jen kuŝas barko surrivere,
Jen ŝprucas akvomuelil',
Hirundoj ludas enaere,
En fragmitar' libela bril'.

Mirinda estas la tremado
De l' ondoj en la sunradi',
La scintilado, la glimado, -
Ne scias miajn pensojn mi.

Traduko de la Germana poemo "Pleistermühle bei Münster" de HERMANN LÖNS *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1996.*

MR-283-1a / Arg-358-711 (2006-03-31 10:07:33)